ĈEA-retkomunikoj 3/2005

CxEA-retkomunikoj = neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por siaj rete atingeblaj membroj kaj por la ceteraj interesatoj.

ENHAVO:
1. LA 11-a KONGRESO DE CxEHxA ESPERANTO-ASOCIO
2. LA 91-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
3. INTERNACIAJ ESPERANTO-ARANGxOJ 2006 EN CxEHxIO
4. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
5. LA NOVA KONSISTO DE LA REDAKTOKONSILIO

1. LA 11-a KONGRESO DE CxEHxA ESPERANTO-ASOCIO
okazis en Vysxkov, de la 21-a gxis la 23-a de oktobro 2005. El la balotado eliris la novaj Komitato kaj Kontrolgrupo de la Asocio:

Membroj de la nova Komitato: Jana MELICHÁRKOVÁ, melicharkova@quick.cz, prezidantino, Petr CHRDLE, chrdle@kava-pech.cz, vicprezidanto respondeca pri internaciaj rilatoj de CxEA, Jiří TOMEČEK, jirka.tomecek@post.cz, vicprezidanto respondeca pri juraj aferoj kaj dokumentoj de CxEA, Pavel POLNICKÝ, cea.polnicky@quick.cz, sekretario, Věra PODHRADSKÁ, podhradska@volny.cz, respondecas pri E-kluboj kaj konferencoj, Miroslav VANĚK, vanekmi@centrum.cz, respondecas pri sekcioj kaj komisionoj de CxEA kaj Vratislav HIRŠ, hirs@gm.vyskov.cz, kasisto.

Membroj de la nova Kontrolgrupo: Josef HRON, josef-hron@volny.cz, prezidanto, Jiří SOUČEK, kaj Věra ŠTĚPÁNOVÁ.

Pro la gxisnuna poresperanta agado kaj meritoj la kongreso nomumis jenajn honorajn membrojn de CxEA: Josef HRON (Pardubice), Ludvík CHYTIL (Přerov), Zdeňka NOVOTNÁ (Česká Třebová), Jindřich ONDRÁČEK (Praha), Bohuslava PELCLOVÁ (Olomouc) kaj Miloslav ŠVÁČEK (Penčice). Korajn gratulojn al ili!

Pli detalajn informojn pri la kongreso inkluzive la rezolucion vi povos trovi baldaux sur www.esperanto.cz.

2. LA 91-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

okazos de la 29-a de julio gxis la 5-a de auxgusto 2006 en Florenco (Italio). Oni povas pagi la kongreskotizon aux per EUR rekte al UEA, aux per cxehxaj kronoj (CZK) al la UK-peranto por Cxehxio: KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice. La plej avantagxa kongreskotizo estas tiu, kiu estos pagita al UEA (EUR) gxis la 31-a de decembro 2005, resp. tiu, kiu estos pagita pere de KAVA-PECH (CZK) gxis la 23-a de decembro 2005. La kongreskotizoj pagitaj pere de la UK-peranto (KAVA-PECH) validaj nur gxis la 23-a de decembro 2005: Individua membro de UEA (ne inkluzivas MG) 3600,-- CZK Ne individua membro de UEA 4500,-- CZK Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA 1800,-- CZK

Kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA 2700,-- CZK
Pagante al la konto de KAVA-PECH (UK-peranto) n-ro
555444-051/0100 (nur CZK!) vi indiku var. simbolon 60829 kaj konst. simb. 308. Se vi pagas pere de la UK-peranto, vi sendu al li ankaux vian aligxilon por UK! Se vi bezonas la aligxilon, bv. peti gxin cxe chrdle@kava-pech.cz. Vi povos trovi la informojn ankaux sur www.kava-pech.cz/uk aux www.esperanto.cz

3. INTERNACIAJ ESPERANTO-ARANGxOJ 2006 EN CxEHxIO:

Semajna Lingva Seminario en Skokovy
okazos de la 18-a gxis la 23-a de aprilo 2006 en la pensiono Espero en la vilagxeto Skokovy (nord-orienta Bohemio). Pli da informoj sur: www.mlboleslav.cz/esperanto aux drahotovaesperanto@seznam.cz

Ekoturisma Seminario (EKOTUR 2006) okazos de la 1-a gxis la 8-a de julio 2006 en la urbeto Dobřichovice apud Prago kaj ties cxirkauxajxo. La seminario invitas ekoturistojn - kaj biciklistojn kaj piedirantojn. Ili iom konatigxos kun la montetaro cxirkaux Dobřichovice, kun Bohemia Karsto kaj dum unu tago ili vizitos ankaux Pragon. Nova estos la eblo boati dum unu tago laux la fluo de la rivero Berounka. Informoj: www.kava-pech.cz/ekotur

La 59-a Kongreso de Internacia Katolika Unuigxo Esperantista (IKUE) okazos de la 8-a gxis la 15-a de julio 2006 en la grava pilgrimloko Velehrad (suda Moravio). Specialan programon por junuloj organizos CxEJ. Informoj: www.ikue.org aux http://mujweb.cz/Spolecnost/Svacek, pri la junulara programo ikue@blahus.cz

La 28-a Renkontigxo de Esperantaj Familioj (REF)
okazos de la 15-a gxis la 29-a de julio 2006 en Pilský Mlýn.
Informoj: PavlaDvorakova@tiscali.cz

La 56-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI)
okazos de la 12-a gxis la 19-a de auxgusto 2006 en la vilagxo Strážné (la montaro Karkonosxo, nord-orienta Bohemio). Informoj: cea.polnicky@quick.cz

Internacia Paroliga Semajno (InPaSem) 2006
Kurso de Esperanto por komencintoj kaj lingva seminario por jamaj parolantoj. Gxi okazos de la 2-a gxis la 8-a de oktobro 2006 en la urbeto Dobřichovice (apud Prago), en la pensiono Sokol.
Informoj kaj aligxiloj: www.kava-pech.cz/inpasem

Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI
okazos de la 6-a gxis la 8-a de oktobro 2006 en Dobřichovice (la lastajn 3 tagojn de InPaSem 2006). informoj: chrdle@kava-pech.cz

Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) 2006 okazos de la 10-a gxis la 12-a de novembro 2006 en la urbeto Dobřichovice (proksime de Prago) en la pensiono Sokol. La temo A (cxefa) estas: Lingvo kaj Interreto, la temo B: Studoj el diversaj

fakoj. Informoj: www.kava-pech.cz/kaest

4. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
Cxehxa Esperanto-Junularo dauxre agadas kaj kreskas. La asocio havas nun 35 membrojn, de kiuj 6 partoprenis auxguste la 61-an Internacian Junularan Kongreson en Zakopane, Pollando. Interrete legebla raporto pri la kongreso verkita de Daniel MRÁZEK publikigxis en TEJO Tutmonde (2005:5), la organo de TEJO. Krome en junulara gazeto Kontakto (2005:3) aperis artikolo de Marek BLAHUŠ kaj Dáša CHVÁTALOVÁ pri Granda Moravio. La junularo okazis oktobre semajnfinan renkontigxon en Třebíč, kie kunvenis 6 membroj. Estas planataj perfektigaj lecionoj de e-gramatiko per interreto, kiujn povos partopreni ne nur junuloj. Aktualajxoj kaj pliaj informoj pri junularo troveblas cxe http://www.esperanto.cz/cej

5. LA NOVA KONSISTO DE LA REDAKTOKONSILIO
La novan redaktokonsilion de CxEA-retkomunikoj kreas cxiuj membroj de la CxEA-komitato (rig. pli supren) + redaktoro de Starto Miroslav Malovec + cxefdelegitino de UEA por Cxehxio Lucie Karesxova + prezidanto de la Kontrolgrupo Josef Hron. Cxiuj cxi cxiam ricevadas la malnetajxon de CxEA-retkomunikoj kelkajn tagojn antaux la dissendo por povi kompletigi ilin.